

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Ing. R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 24

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

APRIO 1934

Latinaj vortoj en Esperanto.

De J. Penndorf, Plauen, Germ.

„Societas Latina“, nove fondita (4-a de majo 1932 en München), celas ree enkonduki la antikve-**latinan** lingvon laŭbezone iom modernigitan kiel universalan por scienco, tekniko kaj trafiko. Ĉu tiu provo sukcesos? Ĉu ĝi estis necesa?

La certe kompetenta profesoro de la kompara lingvistiko W. E. Collinson, Liverpool, en sia prelego dum la „somera universitato“ en Oxford la 5-an de aŭgusto 1930 (= Esperanto-Praktiko, 1930 p. 172) prave konstatis: „Sendube la bazo de mia vortaro estas latina. Kiel tuto la lingvo faras impreson latinidan. La anglaj kaj germanaj devenaĵoj, kvankam sufiĉe grandnombraj, ne ĝenas tiun impreson. Per alldono de finaĵoj kaj akcentigo laŭ alternanta ritmo ili emas latineciĝi.“

La fundamenton de la moderna kulturo ja konstruis la antikvaj grekoj. Do multaj esprimoj kaj terminoj devenas el la **greka** lingvo; sed ĉar ili ĝenerale per la romanoj kaj tra la latina lingvo alvenis al la uzo de la nunaj nacioj, tion ekkonas plej ofte nur la scienculoj, precipe se malestas literoj speciale grekaj (ekz. y, ph), kiujn Esperanto same kiel la itala idicmo anstataŭigas per i, f: greke symphonia = i. sinfonia = E. f. simfonio; f. symphonie, a. symphony. Plue estas vortoj grekaj (origine semidaj, poste latinigitaj): „myrtus“ kaj „myrrha“ (f. myrte: mirrhe, a. myrtle: myrrh) en E. „mirto“ kaj „mirho“; do klariĝas la icm stranga h post r en „mirho“, certe retenata, por eviti kolizion kun la radiko „mir-“.

Same devenas el la greka lingvo la pli-malpli sciencaj esprimoj: freneza (phrenesis), artrito (arthritis), mistero (mysterium), klistero (chysterium), kratero (krater), amelo (amylum: la silabo -el- anstataŭas la ŝajnan sufikson -il-), alciono (alcyon), alkno (alknis), akaro (akari), akno (achne). Kiu estas sperta pri la greka lingvo, povas interpreti kelkajn nomojn de bestoj aŭ kreskaĵoj, ekz. rinocero = rhino-keros t. e. (besto kun) korno sur la nazo; miozoto = myos-otis t. e. orelo de muso, hiskiamo = hyos-kyamos t. e. pork-fabo; leontodo = leont-odont- t. e.

ĉento de leono; levkoĵo = leŭko-ion t. e. blankbrila violo. „Petra“ en la greka lingvo signifas la rokon, same la nemo de l' apostolo Petros t. e. tiu roko, sur kiu Kristo volis fondi sian eklezion. Ĝi troviĝas en „petrolo“ t. e. oleo el roko, „petroselo“ t. e. rokka apio (selinon), „petromizo“ = petromyzon. Ankaŭ kranio (kranion), zono (zone), tropiko (tropikos kyklos t. e. (re)turniĝa cirklo) deriviĝas el la greka lingvo.

Sed laŭ la ĝenerala karaktero en Esperanto ekzistas plejmulte vortoj **origine latinaj**, kvankam Zamenhof prefere elektis tiajn formojn, kiajn enhavas ankoraŭ la modernaj idicmoj latinidaj, precipe la franca, kelkfoje ankaŭ la itala. Ekz. „sinjoro“ devenas de la itala „signore“ (f. seigneur); same egalas al italaj vortformoj jenaj substantivoj: spezo = spesa (f. expensa), bastono = i. bastone (f. bâton), kaldrono = i. calderone (f. chaudron), skatolo = i. scatola (g. Schachtel), punto = i. punta. „Soprano“ estas itala muzika termino; „smeraldo“ (f. émeraude); same egalas al italaj vortformoj jenaj substantivoj: speso = spesa (f. expensa), bastono = i. bastone (f. bâton), kaldrono = i. calderone (f. chaudron), skatolo = i. scatola (g. Schachtel), punto = i. punta. „Soprano“ estas itala muzika termino; „smeraldo“ (f. émeraude). La dusencan latinan substantivum „callx“ Zamenhof diferencigas: 1) kalko — 2) kalkano = i. calcagno. La adjektivo „dolĉa“ devenas de i. „dolce“ (fame konata la esprimo „dolce far niente“) = i. „dulcis; meza = i. mezzo (gr. mesos). La verbo „pagi“ memorigas pri la itala formo „pagare“ = f. payer (diferencigita de „pacare“ = paciĝi), „apogi“ pri i. „appoggiare“ = f. appuyer, „skenmi“ pri i. „schermire“ = g. skirmon, schirmen.

Tamen restas sendube la fundamento **pure latina** de Esperanto. Tio evidentiĝas eĉ el la **gramatikaj** terminoj speciale latinaj: vokalo, konsonanto, silabo (gr.); substantivo, adjektivo, adverbulo, verbo, pronomo, prepozicio, konjunktio, interjekcio; idelklinacio, konjugacio; kazoj: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, ablativo; participo, modo; subjekto, predikato: ĉi ĉiuj en la fundamenta vortaro!

Plue troviĝas la sciencaj esprimoj: arhitekturo (gr.), meĥaniko (gr.); planedo, tropiko, poluso, komuso, folkuso k. a. La teologio bazas sur hebrea-

greka-latina fundamento: papo (gr.), episkopo (gr.), abato (heb.), monaĥo (gr.), paroĥo (gr.), pastro (l.); Mesio (heb.), sabato (heb.), Pasko (heb.), Pentekosto (gr.).

Ĉar la aŭtoro de Esperanto laŭ la profesio estis medicinisto, la fakto ne mirigas, ke en la Universala Vortaro enestas tre multaj esprimoj latine- (aŭ funde: grek-) devenaj koncerne **antropologion** kaj **kuracarton**:

korpo (corpus), kapo (caput), kranio (gr. kranion), tempio (tempus), cerbo (cerebrum), okulo (oculus), pupilo (pupilla), palpebro (palpebra), nazo (nassus), dento (dent-), makzelo (maxilla), faŭko (fauces), palato (palatum), laringo (gr. laryng-), faringo (gr. pharyng-), traĥeo (gr. trachia), kolo (collum), trunko (truncus), membro (membrum), spino (spina), verto (vertex), vertebro (vertebra), osto (os, gr. osteon), kartilago (cartilago), skapolo (scapulae), sakro (os sacrum), brako (brachium), kubuto (cubitum), ulno (ulna), mano (manus), ungo (unguis), pugno (pugnis), femuro (femur-), kruro (crur-), tibio (tibia), maleolo (malleolus), dorso (dorsum), ventro (ventr-), umbiliko (umbilicus), mammo (mamma), kokso (coxa), lumbo (lumbus), ingveno (inguen), muskolo (musculus), tendeno (tendin-); koro (cor), pulmo, hepato (gr. hepat-), reno (renes), lieno (lien), intesto (intestinum), stomako (stomachus), peritoneo (peritoneum gr.), glando (gland-), veziko (vesica), veruko (verruca), kalo (callum), milko (mucus). Aliĝas nur malmultaj **nacilingvaj** vortformoj: lango, buŝo, orelo, piedo (f.);

haŭto, haro, galo, brusto, ŝultro, fingro (gr.).

Malsanoj kaj kuraco:

febulo (febris), pirozo (gr. pyrosis), paralizo (gr. paralysis), fitzo (gr. phthisis), tetano (gr. tetanus), ĥolero (gr. l. cholera), morbillo (morbilli), varicelo (variola), lepro (gr. lepra), ulcero (ulcer-), furunko (furunculus), skrofolo (scrofulae), skabio (scabies), likeno (gr. lichien), akno (gr. achne), favo (favus), pliko

(plica). lentugo (lentigo); hernio (hernia), lakso (laxus), katáro (gr. catarrius), katarakto (gr. l. cataracta), miopa (gr. myops); klistero (gr. klyster), kataplasmo (gr. kataplasma), sublimato (sublimatum).

Nacilingvaj: pipso (a. pip, g. Pips), kokluŝo (f. coqueluche, p. koklusz).

Ankaŭ la **beŝtaron** kaj vegetajaron laŭne nomi la scienculoj kutimas; do Zamenhof preferis ĉi tiujn internaciajn terminojn al la variaj kaj popularaj esprimoj de la naciaj idiomoj. Ree kelkaj nomoj devenas el la greka lingvo aŭ eĉ en orientlanda lingvo havas sian originon.

Mambestoj: kamelo (camelus, gr. sem.), elefanto (elephantus, gr.), pantero (panther, gr.), tigro (tigris, gr.), leopardo (leopardus), leono (leon-), lanko (gr. lynx), rinocero (gr. rhinoceros), bubalo (bubalus), lupo (lupus), vulpo (vulpes), urso (ursus), uro (urus), alko (alces), apro (aper), kapro (caper), kapreolo (capreolus), cervo (cervus), leporo (lepor-), melo (meles), mustelo (mustela), putoro (putorius), sciuro (sciurus, gr. skia + ura; ĉar ĝi ŝajnas havigi al si ombbron (skia) per sia larĝa vosto [ura!]), histriko (hystrix, gr. = porkino harega), erinaco (erinaceus), muso (mus), miogalo (gr. myogale), soriko (soric-), talpo (talpa), didelfio (didelphys), lutro (lutra), kastoro (castor), foko (phoca), baleno (balaena), rosmaro (rosmarus), vesperto (vespertilio). —

Birdoj: akcipitro (accipiter), alaŭdo (alauda), anaso (anas), ansero (anser), ardeo (ardea), cigno (gr. cygnus), falco (falco), fazano (gr. phasianos), fringo, fringelo (fringillus), frugilego (frugilegus), gruo (grus), hirundo (hirundo), hortulano (hortulanus), ibiso (gr. ibis), kardelo (carduelis), kolombo (gr. kolumbos), kolombo (l. columba, i. co-

lomba), korvo (corvus), koturno (coturnix), kukolo (cuculus), meleagro (gr. meleagris), merlo (merula), monedo (monedula), paruo (parus), pasero (passer), pavo (pavo), pego (picus), pigo (pica), pelikano (pelicanus), perdriko (perdic-, f. perdrix), pirolo (gr. pyrrihallas, t. e. fajre-flava), regolo (regulus), skolopo (gr. skolopax), strigo (gr. strix), struto (gr. struthio), sturno (sturnus), tetra, tetrao (gr. tetrao), turdo (turdus), turtro (turtur), urcigalo (urogallus), vulturo (vultur).

Fiŝoj: ezoko (esoc-), gado (gr. gados), gobio (gobius), karaso (gr. l. coracinus = carassius), kampo (campa), perĉo, perko (perca), lojto (lota?), petromizo (gr. petromyzon), salmo (salmo), ŝarko (gr. l. carcharus), siluro (gr. l. silurus), sturgo (sturio), truto (l. trutta, f. truite, a. trout); huzo (acipenser Huso L.); iŝtikolo (gr. ichthyokolla).

Reptilioj: krokodilo (gr. l. crocodilus), testudo (testudo), lacerto (lacerta), serpento (serpent-), ŝkolubro (colubra), aspido (gr. aspid-), vipuro (vipera).

Amfibioj (gr. l. amphibion): rano (rana), bufo (bufo), salamandro (salamandra).

Insektoj (insecta): vespo (vespa), formiko (formica), skarabo (gr. l. scarabeus), kokcineo (coccinella), papilio (papilio), timeo (tinea), kulo (culex), tabano (tabanus), muŝo (l. musca, f. mouche); pullo (pulex), cimo (cimex), pedikulo (pediculus); koĉenilo (coccinella); libelo (libella), grilo (gr. l. gryllus), kantarido (gr. kantharid-), lampiro (gr. lampyrus), silvio (sylvia).

Plue: vermo (vermis), hirudo (hirudo); kankro (cancer), skorpio (scorpio, gr.), ostro (ostreum), sepia (sepia), konko (gr. l. concha), limako (limac-), araneo (aranea), parazito (gr. l. parasitus). (Finota.)

antan terminon, eble **acidelemento**, **acidmaterio** aŭ **acidumo**, kaj havus nun terminon, je kies **maloportuneco** oni devus speciale atentigi en decidoj de kemio, por ke ne erarigu komencantoj. El tiu ekzemplo ni elkkonas:

Ĉar la klasikaj lingvoj ne estas vivaj, ne senper kompreneblaj, ĝuste tial oni evitas, ke terminoj enkondukataj laŭ jam malvalidiĝinta teorio fariĝas tro ĝenaj.

Alia ekzemplo por tio estas la termino **polarizita lumo**, kiu ne ĝenas la fizikiston, kvankam ĝi baziĝas sur malvalidiĝinta teorio.

Alia simila kaŭzo por la konservado de laŭgreka terminaro: Ofte la laŭgreka termino jam internaciiginta estis formita laŭ iu historia, tute sensignifa hazardo. Ekzemple oni hazarde observis en la antikveco, ke la **sukceno** (greke **elektron**) frotite altiras etajn konojn. Tial oni nomis la kvantiton, kiun ne nur sukceno, sed ankaŭ aliaj konoj povas ricevi, **elektreco**. Ĉu mi ĝin nomu **sukcenco**, **sukcencorto** aŭ **sukcencumo**? Aŭ serĉu pli itaĝan, pli karakterizan Esperantan terminon? Oni neniam trovus. Ĉar per sciencaj esploroj oni venis al tute nova koncepto, ne klarigebla per vorto el ĉiutaga vivo. Provanke tion oni venus al senfinaj diskutoj. Kion mi klarigis ĉe la ekzemplo **elektro**, valoras por multaj okazoj.

Estas vere, ke nefakulo bezonas ofte vortaron por legi sciencajn artikolojn, sed tiun ĉi bezonas pro la nekonataj konceptoj, ne pro la fremdaj vortoj. Se oni skribus en ŝerka artikolo pri **sukcencena lumo**, oni devus klarigi ĝuste tiom kaj eĉ pli ol se oni parolus pri **elektra lumo**. La plej multaj homoj ne legas ŝerkajn artikolojn ne „simple pro tio, ke ili ne komprenas multajn vortojn“ sed pro tio, ke ili ne posedas la necesajn konceptojn. La vortoj estas ĝenerale facile terneblaj, la sciencaj konceptoj nur malfacile. Tiun bedaŭrindan fakton oni ne ŝanĝus per aŭtonoma terminaro.

Similaj konsideroj ankaŭ validas por ne pure sciencaj, sed praktikaj teknikaj terminoj. Ĉu ni nomu la telefonon **malproksimen-parolilo**? Tiu vorto pensigus pri la voĉtubo, kiajn oni kelkfoje vidas en antikkvaj kasteloj, kaj kiuj aŭdigas la homan voĉon ĝis distanco de kelkcent metroj. **Malproksimenparolilo** ne klarigas, ke telefono atingas la celon per elektromagnetaj principoj. Se ni pro tio uzus terminon **elektromagneta malproksimenparolilo**, oni povus riproĉi al tiu monstro la du fremdajn radikojn en la unua vorto. Krom tio ĝi pensigus la fakton al radio!

Sekve ni estu kontentaj, ke ekzistas jam en la naciaj lingvoj internacia terminaro, ke ni havas nian § 15 en la Fundamenta Gramatiko, kaj ke la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) jam kunmetis iom ampleksan terminaron.

Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ĉu aŭtonoma, ĉu greko-latina scienca terminaro?

De H. Sirk, Profesoro de Fiziko en la universitato de Ljubljana.

En „Lingva Kritiko“ de oktobro 1933 s-ro Haberler publikigis interesan artikolon „Sciencaj vortoj en Esperanto“, en kiu li riŝate al sciencaj terminoj aŝertas, ke „la lingvo estu en ĉiuj siaj partoj interkomprenilo por ĉiuj siaj anoj. . . . Se oni bezonas novan esprimon, oni serpu ĝin el la al ĉiuj konata lingvotrezoro. . .“ Tiel li rekomendas kiel eble plej memstaran, aŭtonoman terminaron. Li argumentas per traduko el germana de popularscienca artikolo koncernanta mineralogion. Certe li imagas tiujn konsilojn validaj por ĉiuj sciencaj faktoj. Rilate al aplikado de tiaj konsiloj al fiziko kaj kemio mi atentigas pri la sekvantaj konsideroj, kiujn mi unue klarigas per ekzemplo el kemio.

Kiam fine de la 18-a jarcento oni estis eltrovinta la elementon oksigeno, oni pensis, ke ĝi kaŭzas la acidecon en siaj kombinaĵoj.

Tial oni nomis la elementon oksigeno per vorto ĉerpita el greka lingvo, kiu signifas proksimume „naskanto de acideco“. Tiu vorto fariĝis tre internacia, sed en germana lingvo pli forte enradikiĝis la germana vorto Sauerstoff, kiu havas analogan signifon.*) Kelkajn jarojn pli poste oni elkkonis, ke ne la oksigeno, sed la hidrogeno kaŭzas la acidecon. Kompreneble, oni ne plu povis forigi ĝin ne plu motivitan terminon. Nun la germana lingvo havas erarigan terminon por tiu elemento en germana formo, aliaj lingvoj en greka formo. Ĉi tio estas malpli ĝena, ĉar la grekan vorton komprenas nur homoj kun intereso por etimologio. Laŭ s-ro Haberler oni estus devinta enkonduki por tiu elemento kiel eble plej klaran Esper-

*) Simile kiel la germana faras la rusa, kaj kelkaj aliaj lingvoj.

Alkompletigo al „Pri la refleksiva pronomo“.

De Meguru Takahaŝi.

Mi ne dubas, ke vi estas ankoraŭ tiom pacienca, nur por tralegi ĵenan represon kiel la detero de D-ro Lippmann, senditan al mi je la 18-a de aprilo 1933.

Tre estimata s-ro Takahaŝi!

Mi kore dankas al vi pro via afabla lasta detero kun la interesa traduko de la japana parto de via artikolo.

Pri la aliaj demandoj:

Mi neniam diris, ke mi persone preferas ŝia al ŝia en la Sara-frazo. Mi nur trovis la frazon tia ĉe Zamenhof kaj provis klarigi la unuavide kontraŭregula ŝajnantaŭ uzon de ŝia anstataŭ ŝia. Se mi estus la aŭtoro de tiu frazo, mi eble estus preferinta ŝia.

Zamenhof mem supozeble ne pripensis la aferon, kiam li faris sian tradukon. Li simple tradukis laŭ sia lingva sento, kaj ĉi tiu rekomendis al li la formon elektitan. Ni devas konsideri, ke tiuj komplikaj lingvostudoj, kiujn poste faris la esperantologoj, ankoraŭ ne estis faritaj, kiam Zamenhof verkis siajn tekstojn. Tial oni povas kelkfoje apogi sur la Zamenhofa lingvo-uzo opiniojn tute diferencajn.

Nun pri viaj frazoj:

1. D-ro Jeddler ne povis sin deteni montri tian grandan intereson je la reveno de ŝia malnova lernanto (Bat. de l' Vivo 42/5). Tio estas kazo laŭ MB 5 c de mia „Refleksiva Pronomo“. La amiko estas la subjekto de la ago esprimita per reveno. La kaŭzo por la — regule nekonscia — prefero al la refleksiva pronomo en tiaj kazoj estas, ke oni neniel povas rilatigi la pronomon en tia dependa propozici-parto al la subjekto de la ago esprimita per la dependiga substantivo. Mankas do ĉia kaŭzo por eviti la refleksivan pronomon pro la danĝero de miskompreno.

2. . . . respondis Clemency kun la kutima movo de siaj membroj (B. d. l' V. 45/6).

Ĉi tiu frazo estas tute regula laŭ MB 5 b. Ŝi movas siajn membrojn, do movo de siaj membroj.

3. Ŝi penis kaŝi la tremadon de ŝia voĉo (Marta 106/2 d. ms.).

Jen kazo laŭ MB 5 c same kiel 1. kaj

4. . . . kongresoj . . . povus . . . uzi ĝin por reciproka komprenigado de siaj membroj (F. K. 286/6).

Ankaŭ la frazo de s-ro Jung apartenas al MB 5 c: Ŝi ne povis toleri la frostotremadon de siaj (siaj) infanoj, ĉar la infanoj frostotremas.

Do ĉio ĉi ne enhavas iun argumenton, kiu povus pruvi kiel neĝustan ion, kion mi pli frue skribis pri ĉi tiu afero.

La t. n. klarigo de s-ro Ossalka ne abdonas ion novan al la problemo, ĉar tian relativ-propozicion oni povas formi preskaŭ ĉiam, sen gajni ion per tio. Mi uzis la saman „klarigon“ en MB 5 a nur kun la (malgrava) diferenco, ke mi preferis la partupon, kiu estas ĉiam anstataŭigebla per relativ-propozicio.

Ankaŭ la frazo: li vidis la trariletadon de ŝia sango — evidente apartenas al MB 5 c, ĉar la sango trariletas.

Se iun influon havis via detero al mia

opinio, ĝi estas tiu, ke — alie ol en mia detero de la 26.1. 1931 — mi nun ne plu opinias forigebla la specialan regulton rilatantan al MB 5 c.

Mi salutas vin altestime kaj samideane
via Dr. W. Lippmann (subskribo).

Kontenta je tio, ke mia detero havis al ĉi tiu opinio iun influon, kaj li parolas ĝuste tion, kion mi volis paroli, mi nun ĉesas skribi; sed tio ne signifas, ke ĉio, kion mi esperis ĉe la komenco, estas plenumita. Mi ne povas kompreni nur, al kio entute helpas la

Bibliaj esprimoj en Esperanto.

4)

De Joh. Hartog.

N-ro 991: Konigas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago. — Vidu sub la paragrafo pri n-ro 256.

N-ro 996: Mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra. — Kristo instruas, ke oni ne devas fieri pri siaj faroj, kiel faris la fariseoj tiutempaj. Klare montras ĝian signifon la vortoj el la evangelio mem: „Tial, kiam vi donas almozon, ne sonigu trumpeteton antaŭ vi, kiel faras la hipokrituloj en la sinagogo kaj sur la strato, por havi gloron de homoj. Sed kiam vi donas almozon, ne lasu vian maldekstran manon scii, kion faras via dekstra“ (S. Mateo VI, 2 kaj 3).

N-ro 1046: Ŝtono de falpuŝigo. — Ĉi tiun esprimon oni povas plurfoje trovi en la Biblio. Unuafoje ĝi troviĝas en Jesaja VIII, 14: „Li estos sanktaĵo kaj ŝtono de falpuŝigo kaj roko de alfrapigo por la du domoj de Izrael, kaptulo kaj ŝtalo por la legantoj de Jerusalema“.

Per ĉi tiuj vortoj la profeto pentras al la leganto la altecon de Dio kaj Ties sanktan severecon.

S. Paŭlo citas en sia epistolo al la Romanoj, kiam li klarigas la kialojn, pro kiuj la judoj ne akceptis la kristanisman: „Car ili sekvis ĝin ne per fido, sed kvazaŭ per faroj. Ili falpuŝigis ĉe la ŝtono de falpuŝigo; kiel estas skribite: Jen mi kuŝigas en Cion ŝtonon de falpuŝigo kaj rokon de alfrapigo; kaj tiu, kiu fidas al li, ne estos hontigita“ (Romanoj IX, 32 kaj 33).

Same faras S. Petro, kiam li skribas al la kristanoj en Malgranda Azio: „Car estas enhavate en skribo: ŝtono de falpuŝigo kaj roko de alfrapigo“ (I. Petro II, 6 kaj 8).

Per la esprimo oni nun indikas ion, kio kaŭzas indignon.

N-ro 1061: Propeka kapro. — Okaze de la Tago de Pekliberigo la ĉefpastro de la israelidoj devis preni du kaprojn. Tiam li devis fari pri ili. Unu el la du estos destinita por Dio kaj la alia por la diablo. La unuan kapron la ĉefpastro devis oferi al la Eternulo, mortiginte ĝin. „Kaj la kapron, sur kiu fadis la loto por Azazel (t. e. la diablo), li starigu vivan antaŭ la Eternulo, por fari super ĝi pekliberigon kaj forsendi ĝin al Azazel en la dezerton“ (Levidoj XVI, 10).

pena provo klarigi la unuavide kontraŭregula ŝajnantaŭ (do duavide laŭregula ekŝajnantaŭ) uzon de ŝia anstataŭ ŝia; kaj kial li ne kuraĝas forigi la ekzemplojn de Sara kaj Marta el MB 5 b, por eviti la danĝeron de miskompreno, kiel ĝin jam faris s-roj X, Y, Z kaj aliaj.

*

Jen gravaj korektoj: Vol. 1, n-ro 15; paĝo 3, kolumno 2, linio 9: Ekz. (anst. Esp.); 4, 1, 3 havas (anst. kavas); 4, 1, 30 laboro?; 4, 1, 44 min, kiu; 4, 3, 4 tial (anst. tiel); 4, 2, 62 substantivo (sen artikolo); n-ro 16: 3, 3, 14 La (anst. la); 4, 2, 17 permesas agi; 4, 3, 52 de li, mondifama stilisto, estas (kiel tekstis la originalo); n-ro 18/19: 6, 2, 40 frazero (anst. frazezo); 6, 3, 18 legitimas (anst. permesas); 6, 3, 21 vivas (anst. vivas); 6, 3, 22 La ekzemplo troviĝas ĉe (H. 64/19); 6, 3, 33 fariĝis (anst. forigis); 7.1.1. kvazaŭ-vokativoj; 7, 2, 2 difinon al (anst. de).

Unue laŭ la rituro la ĉefpastro devis pekliberigi la templon (tabernaklon), la altaron, sin mem kaj sian domon kaj la tutan popolon aspergante per la sango de la buĉita kapro kaj „kiam li finos la pekliberigadon de la sanktejo kaj de la tabernaklo de kunoŭeno kaj de la altaro, li akonduktos la vivan kapron, kaj li metos siajn ambaŭ manojn sur la kapon de la viva kapro kaj konfesos super ĝi ĉiujn malbonaĵojn de la israelidoj kaj ĉiujn iliajn krimojn kaj ĉiujn iliajn pekojn, kaj li metos ilin sur la kapon de la kapro kaj forsendos ĝin per speciala homo en la dezerton. Kaj la kapro forportos sur si ĉiujn iliajn malbonaĵojn en landon serikomunikigan; kaj li forrigos la kapron en la dezerton“ (Levidoj XVI, 20, 21 kaj 22).

Nun oni nomas ĉi tiu propeka kapro, kiun aliaj ĉiam nomas la kulpuŝo.

En traduko de D-ro L. L. Zamenhof mi havas ekzemplon: „Ĉie la hebreo estas ja la propeka kapro“, t. e. ĉie oni kulpuŝas la judojn pri malfeliĉoj. (La Gimnazio, pĝ. 67, linio 1/3).

N-ro 1167: Neniu estas profeto en sia urbo. — Kristo foje estis en sia loĝloko Nazaret kaj tie vizitis la sinagogon por prediki. Ĉiuj ĉeestantoj tamen ofendiĝis pro li kaj icm moke demandis sin, de kie li estas. Tiam Kristo diris al ili: „Neniu profeto estas akceptata en sia patrujo“ (S. Luko IV, 24; kp. ankaŭ S. Mateo XIII, 57; S. Marko VI, 4 kaj S. Johano IV, 44).

Se oni volas fari ion en propra urbo, la homoj molas onin. Profetoj kaj granduloj devas veni de ekstere.

N-ro 1028: Kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso. — Je la lastaj tagoj de Kristo, ties perfidanto diris al siaj kunhelpantoj, ke ili devas kapti tiun homon, kiun li indikos per kiso: „Jen venis Judas, unu el la dek du (t. e. la 12 disĉiploj de Kristo); kaj kiam li granda homamaso kun glavoj kaj bastonoj venis. Kaj lia perfidanto jam aranĝis kun ili signon, dirante: Kiam mi kisos, tiu estas li; kaptu lin. Kaj tuj veninte al Jesuo, li diris: Saluton, Rabeno; kaj kisis lin“ (S. Mateo XXVI, 47—50; kp. ankaŭ S. Marko XIV, 43—46; S. Luko XXII, 47—49 kaj

S. Johano XVIII, 1-13; en lasta evangelio aludo pri kiso ne troviĝas.

Judas'a kiso estas perfido.

Ĉi tie estu la fino. Mi esperas, ke mi donis al multaj la eblecon iom pli kompreni la esprimojn, kiuj sin bazas sur la Biblio. Komprenible tiuj, kiuj loĝas en kristanaj regionoj, pli ofte uzas kaj aŭdas ĉi tiujn esprimojn; sed verŝajne ili ankaŭ jam penetris al aliaj landoj. Sciante la originon proverboj ja estas tiam pli bone komprenblaj. „Venas proverbos el popola cerbo“ (n-ro 1159), sed la popola cerbo komprenible ĝin prenis de alie jam antaŭ longaj tempoj, kiam la Biblio por la popolo estis la sola libro.

Pri radikoj unuseksaj.

Ekzistas en Esperanto certaj radikoj, kiuj povas esti aplikataj nur al in-seksuloj. Inter tiaj troviĝas *graved'*, *matron'*, *nimf'*. Malgraŭ ke la vortaroj preskaŭ, se ne tute, ĉiam donas „gravedulino“, kelkaj praktikantoj opinias, ke laŭ la principo de sufiĉo starigita de Saussure ni rajtas uzi simple „gravedulo“. Pro kio do la vortaristoj enregistras la formon kun -in? Sendube ĉefe pro tio ke, fidele penante speguli sur siajn paĝojn la komunan lingvo-uzon, ili konstatas, ke la esperantistoj prefere aŭ instinkte uzadas la -in-formon, pro ĉi ties pli forta vokali-povo, kiu fulme ĝetas antaŭ la internaj okulojn la bildon de virino maskonta; mankas al simpla -ul- la necesa pensasocio pri-ineca.

Matrono (samorigina kun patrino), kiu derivas ĉe ni povas retroseki jam ĝis la sanskrita matr (patrino), estas kun siaj derivaĵoj trovbla kiel ina senco en tre multaj lingvoj. Konfese, Zamenhof uzis „matronino“ ĉe Hamleto 105:

Se la infer' sovaĝa povas boli

En membroj de grandaĝa matronino, sed almenaŭ partalkaŭze pro la metriko, logike necese, ĉar matrono ja povas signifi nur virinon (Kp. Marta p. 190, 206; Fab. de And. vol. I, p. 19).

Al la korelativa „patrono“, samorigina kun patro, kaj dum jarcentoj nepre virseksenca, ni nun senhezite almetas la -in-sufikson, laŭ analogo patro—patrino, ĉar jam de longa tempo estiĝis nova aldonata signifo, kiu emprenas ankaŭ la virinojn.

La sufikso radikoj *virg'* ne estas strikte in-senca, ĉar en certaj kontekstoj ni povus uzi *virgulo*; *vinga tero*, kaj *sim*, estas oftaj.

Malfacile estas doni ekzemplojn de radikoj aplikablaj nepre nur al la virseksaj; necesus por tio oficoj, funkcioj, naturaj apartaĵoj, malsanoj aŭ sim., pri kiuj ni ne povus koncepti, ke virino povus ilin havi. *Kantor'*, *sakristi(an)'*, *pap'*, eĉ *eĥnuk'* povas en kazoj de neceso aŭpreni la -in.

Ĉe la popolabeloj, *fe'*, *el'*, *kobold'* estas plejofte rigardataj kiel senseksaj; *nimf'*, *parc'*, *muz'*, *furi'*, *gorgon'* estas nepre inaj; *siflo* (F. sylphe) estas elfo (Zam.); *siflino* (F. sylphide) estas elfino (Zam.)!

R. Banham.

Naciaj lingvoj kaj neologismoj.

Estas interese konstati, ke ankaŭ la naciaj lingvoj havas sian neologisman problemon. En nova libro „Slango: Hodiaŭ kaj Hierau“, ĵus eldonita en Anglujo, oni trovas trakt-

adon pri la efikado de la amerika slango sur la angla lingvo. Almenaŭ unu anglo ne timas la pereigon de lia lingvo pro la konkolduko de neologismoj.

La aŭtoro kredas, ke la senĉesa interpenetrado de amerikanismoj en la anglan lingvon estas rimedo, per kiu tiu lasta, helpe de la daŭraj kaj plej bonaj el inter ĉi tiuj novevenantoj, retenos sian ĵunecon. Li diras:

„Ni distingu, efektu la amerikanismojn plej taŭgajn por la spirito de la angla lingvo, kaj ilin adaptu por niaj lingvaj celoj. Per zorga elektado kaj per ne malpli zorga adaptado, ni estos ebligataj, se la bezono naskiĝos, anstataŭigi eluzitan aŭ malmodernan anglismon per forta, pitoreska amerikanismo, aŭ bonvenigi veran neologismon; sed ni devus akcepti nur tiujn amerikanismojn, kiuj montriĝas uzindaj en ĉi tiuj plej bona el ĉiuj manieroj.“

G. Badash.

LINGVA TRIBUNO

Pri teknikaj gramatikaj vortoj.

S-ro H-s K. estas iom prava: multaj vortoj en Esperanto naskas konfuzon en sia uzado, pro tio ke ilia signifo ĝenerale ne estas la sama ĉe la diversaj popoloj; ni citu nur: *prudento*, *diboĉi*, *domaĝi*, *ŝanceli*, *demandi*, *oferi*, *rimedo*, k. a. Tial oni devas nepre uzi tiajn vortojn kun ilia primitiva fundamenta senco, aŭ ilin eviti, se tiu senco ŝekas. Por ekzemplo, mi neniam uzas la verbon *domaĝi* en la Zamenhofa senco; mi ĝin anstataŭigas per *avari*, *prizorgi*, *indulgi* aŭ *spari*. Koncerne la gramatikajn esprimojn, mi konstatis konfuzon nur rilate al *malsimpla*, *atributa*, *predikata*, *objekto* kaj *komplemento*.

Nu, *malsimpla* vorto estas aŭ derivita per afiksado (*monero*, *monujo*) aŭ kunmetita (*monavide*, *monpuno*). *Malsimpla tempo* estas komponita: „mi estis skribanta, kiam vi venis“. *Malsimpla subjekto* estas kompleksa, se ĝi estas determinata per komplemento: „la infanoj de nia amiko ludas en la ĝardeno“, aŭ pluropa: „mia onklo, mia bofrato kaj mia kuzo venos hodiaŭ.“

Anstataŭ diri: *atributa nomo*, *atributa adjektivo*, oni diru prefere: *apozicia substantivo* (*mia filo*, *Karlo*), aŭ *epiteta*, *apudmeta adjektivo* (*bona vino*, *bela vetero*). *Predikato* estas substantivo aŭ adjektivo, kiu rilatas ĝenerale al la subjekto de la verbo esti: (li estas profesoro, mi estas juna). Tial ĉaze la adjektivo nomiĝas *predikata*: (la vino estas bona, la vetero estas bela).

La vorto *objekto* havas tre klaran signifon: ĝi montras tion, kion trafas la ago de la subjekto: „mi amas mian patron; mi obeas al mia patro“; en la unua ekzemplo, la objekto *mian patron* estas en la akuzativo kaj nomiĝas rekta komplemento, de la transitiva verbo mi amas; en la dua, la objekto *mia patro* estas antaŭirata de prepozicio kaj estas la nerekta komplemento de la netransitiva verbo mi obeas. Ekzistas ankoraŭ multaj aliaj komplementoj cirkonstancaj por esprimi la tempon, la lokon, la kaŭzon, la manieron. Cetere, kiu volas instruiĝi pri gramatikaj aferoj, tiu konsultos kun profito la verkojn de *Fruictier*, *Stamatiadis*, *Grosjean-Maupin* kaj *Wüster*.

H. Boucon.

Konvinki — persvadi.

(Vidu en n-ro 21 de decembro 1933.)

La difino de Kabe koncerne „persvadi“ ne estas ĝusta. El tiu erara klarigo jam rezultis multnombraj netrafaj aplikoj. Fakte estas, ke konvinki = *überzeugen* (germane). Se mi konvinkas iun pri io, li nepre kredas tion; se mi persvadas iun = jemand *überreden*, li ankaŭ faras aŭ agas laŭ mia deziro, eĉ se li ne estas konvinkita. Ĉu tio, pri kio temas mia persvado, estas ĝusta aŭ ne. Tria esprimo estas germane: *zureden*; jen la vorto, kiu Kabe difinis sub la erara radikoj *persvad'*. — *Zureden* = per vortoj provi decidigi iun fari ion ajn; mankas radikoj en Esperanto por trafe per unu vorto traduki la germanan: *zureden*. En tiu „*zureden*“ kaŝiĝas nek konvinki nek persvadi. — Ankaŭ D-ro M. eraras asertante, ke „*überzeugen*“ kaj „*überreden*“ estas sinonimoj, absolute ne!!! Dum la miljara evoluo de la latinidaj idicmoj perdiĝis la klara difino de la latindevenaj radikoj, kiuj plene konserviĝis en la germana lingvo. *Convincero* = *überzeugen* = fari per pruvoj, ke iu akceptas ion kiel veran aŭ pravan. *Persuadero* = *überreden* = sukcesi kredigi ion al iu. — Male al D-ro M. mi nepre akcentas, ke la nuanco inter la du radikoj estas tre granda kaj tre facile difinebla, kaj ke ĝi pravigas — eĉ postulas — la ĝeneralan erkondukton de persvadi.

M. Eutin.

*

Konvinki — persvadi.

En la Lingva Kritiko (n-ro 21) s-ro Bruno Migliorini demandas, kiajn nuancojn havas la supraj vortoj en la neokcidentaj lingvoj. Mi raportas pri la hungara lingvo.

Konvinki hungare estas *meggyőzni* (meg estas verba prefikso kiu varia senco; *győzni* signifas *venki*). La senco de la vorto estas identa al la difino de la Plena Vortaro.

Persvadi hungare estas *rábeszélni* (rá: sur kiu akuzativo; *beszélni*: paroli). La senco de la vorto estas: konvinki, decidigi iun, ke li faru ion.

Do la frazon „Vi min konvinkis, sed ne persvadis“ hungare komprenas jene: „Vi sukcesis prui al mi, ke via vidpunkto estas ĝusta, sed vi ne sukcesis min decidigi, ke mi faru tion, kion vi deziras de mi baze de ĉi tiu vidpunkto.“

Laŭ ĉi tio konvinki signifus nur kredigon, dum persvadi signifus agigon.

K. Kalocsay.

*

„Pasaĝero.“

En „La Rabistoj“, p. 59, Zamenhof uzis la vorton *pasaĝero* por signifi *penpiedan*, aŭ *perĉovalan vojaĝanton*. Tio estas rimarkinda, ĉar, kiel konate, en Esperanto oni ĝenerale rezervas tiun por signifi „veturanto, kiu uzas publikan rimedon por veturi (vaporŝipon, fervojon, omnibuson ktp.)“ (Kabe). Povis inteli en la franca „*passager*“, kiu eĉ nun francoj uzas en senco de *pred-vojaĝanto*. Ĉi tiu konekse interesa estas fakto, ke la anglalingva vortaro Webster donas kiel primaran difinon: *Homo, kiu pasas sur sia vojo; vojaĝanto, pilgrimanto, vojiranto*. Ĝia dua difino estas sama kiel tiu de Kabe. Webster aldonas, ke la unua signifo estas jam mallofta, se ne kunigata al la vorto „*foct*“ (t. e. „*penpieda*“).

R. Banham.

Legu bonsilajn librojn!